Scienca Revuo Vol.46 (1995)(1) - 166

... La ĉefaj principoj de la vortuzo en Esperanto estas la sekvaj:
a) Ĉiu vorto, kiu troviĝas en la Universala Vortaro estas leĝdona por ĉiuj esperantistoj, kaj neniu en la mondo, nek la aŭtoro de Esperanto nek ia alia esperantisto havas la rajton fari en tiuj vortoj ian ŝanĝon (se ekzemple anstataŭ "ŝipo" iu uzas la vorton "navo", ĉar la vorto "ŝipo" al li "ne plaĉas" - tio estus rekta peko kontraŭ la unueco de nia lingvo kaj ĉiuj esperantistoj tiam protestus).

b) Se vorto per si mem estas *internacia,* tiam laŭ la regulo 15 de nia gramatiko ĉiu havas la rajton uzi tiun ĉi vorton, kvankam ĝi ne troviĝas en la Universala Vortaro. (Ekzemple neniu povus protesti kontraŭ la uzado de la vortoj "aŭtoro", "telegrafo" k.t.p., kvankam ili ne troviĝas en la Universala Vortaro.)

c) Sed se ia vorto nek estas sendube internacia nek havas por si apartan radikon en la Universala Vortaro kaj esprimi ĝin per kunmeto de radikoj jam ekzistantaj estas aŭ tute ne eble, aŭ tro neoportune, aŭ teknike ne precize, - tiam tiun ĉi vorton ĉiu aŭtoro povas mem krei laŭ sia bontrovo, tiel same kiel oni ĝin faras en ĉiu alia lingvo. Tiu ĉi permeso estas *necesa,* ĉar alie la lingvo estus tro rigida kaj multajn ideojn oni tute ne povus esprimi en ĝi. Sed ĉar ne ĉiuj personoj povas mem krei al si vortojn kaj ĉar estas dezirinde, ke ĉiuj uzu la novajn vortojn kiom eble *egale,* tial ĉiu nove aperanta vortaro ordinare enhavas en si kelkan nombron da novaj vortoj sub la kontrolo...

***Lingvo Internacia,* 1904, p. 336-338.**

Scienca Revuo Vol.46 (1995)(1) - 166

KOLEKTADO DE VORTOJ POR BELARTA VORTARO

Aulo MINELL

ENKONDUKO

Tiu ĉi artikolo celas montri kelkajn el la malfacilaĵoj, kiuj minacas konsekvencecon de la laboro. Oni demandis min, *kiamaniere vi inventas la vortojn?* Estas malprave supozi, ke mi - kvankam inventisto - aŭ iu alia inventas la vortojn, tute ne, nur Zamenhoff meritas la respekton ĉi rilate. Verdire, estas tiel, ke la vortoj jam ekzistas iamaniere, aŭ ekzistas en la komuna lingvo aŭ oni kreas el la aliaj radikaj vortoj aŭ oni prenas la vorton el iu alia lingvo - precipe fruktodona estas la franca, kiu ĝis nun funkcias kiel lingvo de belartistoj. La plej granda problemo estas elekti la konvenajn vortojn el tro vasta vortostoko tiel, ke la vortoj plenumas la postulojn de Esperanto - fonetiko, gramatiko, ortografio, strukturo, historio, internacia kulturo, kolizio kun jam ekzistantaj esprimoj ktp. Pliposte mi klarigas la multflankecon de la laboro pere de la ekzemploj el la kategorioj: artfako, artoskolo, farbmaterialo, koloro, kolornuanco kaj suspensiaĵo. La materialo el kiu mi eltiras la fragmentojn estas 60 paĝoj el la 500...1000 eblaj.

EKZEMPLOJ

ARTFAKO

1. FRESK/ARTO [P] Artfako. En ĝi oni pentras per akvaj farboj sur freŝa kalkostukaĵo de muro, kun belartisma celo. Vp: 6. Vidu: Freskpentrarto. **-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/O** Produkto.

2. IKEBAN/O [P] Artfako. En ĝi oni faras komponaĵojn el floroj, branĉoj, folioj ktp, en poto aŭ vazo, kun belartisma celo. Ĝi originas el Japanio. Vp: 6. Vidu: Floraranĝarto. **-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/AĴO** Produkto.

3. JUVELART/O Artfako. En ĝi oni desegnas kaj elfaras juvelojn, kiuj estas gemoj kaj grandvaloraj ornamaĵoj. **-/ISTO** Praktikanto. **-/ADO** Ago. **-/AĴO** Produkto.

4. ENSCENIG/ARTO, -/ISTO = REĜISOR/ARTO [P] **, -/ISTO, = SURSCENIG/ARTO, -/ISTO.**

ARTOSKOLO

5. FAŬV/ISMO Artoskolo en pentroarto, kiun karakterizas dekoreco, forta ritma konturo kaj intensaj, puraj, unuecaj kolorareoj. Pro tio oni donis la kromnomon "dekoreca

ekspresionismo". Ĝi estas franca artoskolo de ekspresionismo. Ĝi aktualis komence de la jarcento kaj kontraŭis la impresionismon. Vidu: Dekoracia ekspresionismo. **-/ISTO** Ano. La skolanoj: BRAQUE Georges franca pentristo, skulptisto kaj grafikisto, DERAIN André franca pentristo, grafikisto kaj skulptisto, MARQUET Albert franca pentristo,desegnisto kaj grafikisto, ROUAULT Georges franca pentristo kaj grafikisto, VLAMINCK Maurice de franca pentristo kaj grafikisto.

6. FUTURART/ISMO Artoskolo en literaturo kaj arto, kiun karakterizas ne ligiteco kun estinteco, sed kontraŭeco al tradicio kaj tendenco krei tute novan, kiu sugestie esprimas la modernan vivon. Ĝi havas kolorskalon de novimpresionismo, geometrecon de kubismo, kaj prezentas kontinuan movon sur sama bildo. Oni taksas ĝin kiel la plej ekstrema fenomeno de ekspresionismo. Ĝi aktualas ekde la 1909. **-/ISTO** Ano. La skolanoj: BALLA Giacomo, BOCCIONI Umberto, CARRA Carlo, MARINETTI Filippo Tommaso, RUSSOLO Luigi, SEVERINI Gino, SYBERG Fritz (Christian Frederick) dana pentristo.

7. NEVALID/ISMO [P]**, -/ISTO = NULART/ISMO, -/ISTO = TRIFLING/ISMO** [E]**, -/ISTO.**

8. SUPERACIONAL/ISMO [P 1]**, -/ISTO = SUPER-RACIONAL/ISMO, -/ISTO <> SUPEREAL/ISMO** [1]**, -/ISTO = SUPERREAL/ISMO, -/ISTO = SUREAL/ISMO** [P 1]**, -/ISTO = SURREAL/ISMO, -/ISTO.** *1. ROSSETTI preferis la formon* ***SUREALISMO.***

FARBMATERIALO

9. CINABRORUĜ/O Farbmaterialo. HgS. 15,5A0,9. 0,0006081 mm. a.k.o.s.v. Eblas miksi kun Ci, Ka, Kf, Kr, Li, Ul, Zi, Zs. An: Chinese vermilion, Cinnober, Cinnabar, English vermilion Vermilion; Fi: Sinooperi, Sinooperinpunainen; Fr: Cinabre, Vermillion, Vermillion française, Vermillon; Ge: Zinnober; Hi: Vermiljono; It: Cinabrio; La: Minium; Sv: Cinnober. Vp:oj 6 kaj 7. Ĝin oni konas de la 400 aKr. Ĝia malbona trajto estas la nigriĝemo. **-/A** Kolornuanco.

10. KADMIRUĜ/O Farbmaterialo. Miksaĵo de [CdS kaj CdSe] S. 15,5A0,9. 0,0006048 mm. a.k.l.o.s.v. Norma farbmaterialo. Eblas miksi kun Ci, Ka, Kf, Kr, Li, Pr, Ul, Zi, Zs. An: Cadmium red; Fi: Kadmiumpunainen; Fr: Rouge de cadmium; Ge: Kadmiumrot; It: Rosso di cadmio: Sv: Kadmiumrött. Vp:oj 6 kaj 7. Ĝi postulas 40% da oleo. Kiel artista farbmaterialo oni konas ĝin ekde la 1910. Ĝi havas bonan rezistemon. **-/A** Kolornuanco.

11. PRUSBLU/O Farbmaterialo. $3[Fe^{II}(CN)_6]^{IIII} + 4Fe^{III} \rightarrow Fe_4[Fe^{II}(CN)_6]_3$. 3,5G0,8. 0,000472 mm. l.o.s. Norma farbmaterialo. Eblas miksi kun Kro, Pb, Pm, Pr, Zi.An: Antwerp blue, Berlin blue, Chinese blue, Paris blue, Prussian blue; Fi: Berliininsininen, Pariisinsininen, Preussinsininen; Fr: Bleu de acier, Bleu d'Anvers, Bleu de Berlin, Bleu de Chine, Bleu de milori, Bleu de Paris, Bleu de Prusse; Ge: Diesbachblau, Eisenblau, Pariserblau, Peussisch blau; It: Azzurro di Berlino, Azzurro di Parigi, Azzurro di Prussia; Sv: Berlinerblått, Järnblått, Pariserblått,

Preussiskt blått. Vp:oj 6 kaj 7. Ĝi postulas 60...80% da oleo. Ĝi estas facile sekiĝema, kaj sufiĉe bona farbmaterialo. **-/A** Kolornuanco.

12. KROMOFLAV/O, -/A. KROMOVERD/O, -/A. KROMOOKSIDVERD/O, -/A.

13. LAZURBLU/O Farbmaterialo. **-/A** Kolornuanco.

KOLORO

14. BLU/A La koloro de la ĉielo. Sur la 20ona kolorcirklo, 0. viola...19. purpurviola, havas la lokon 4. Ondolongo 0,000475 mm. 4A...Ĝ1,0. Vp: 7.

15. FLAV/A Koloro de betulfolioj en aŭtuno, kaj de oro kaj citrono. Sur la 20-ona kolorcirklo, 0. viola...19. purpurviola, havas la lokon 12. Ondolongo 0,000573 mm. 12A...Ĝ. Vp: 7.

16. RUĜ/A La koloro de la sango. Sur la 20-ona kolorcirklo, 0. viola...19. purpurviola, havas la lokon 16. Ondolongo 0,000614 mm. 16A...Ĝ1,0. Vp: 7.

17. VERD/A La koloro de la folioj. Sur la 20-ona kolorcirklo, 0. viola...19. purpurviola, havas la lokon 8. Ondolongo

0,000544 mm. 8A...Ĝ1,0. Vp: 7.

18. VIOL/A Miksaĵo de ruĝa kaj blua farbo. Sur la 20-ona kolorcirklo, 0. viola...19. purpurviola, havas la lokon 0. Ondolongo - 0,000566 mm. 0A...Ĝ1,0. Vp: 7.

KOLORNUANCO

19. BETULBLANK/A P Kolornuanco. 14B0,2. ORANĜA-BLANKETA-KOLORETA. An: Birch bark; Fi: Tuohenvalkoinen; Fr: Blanc écorce de bouleau; Sv: Nävervitt. Vp:oj 6. kaj 7. Vidu: Betulŝel-blanka.

20. KOLOMBABLU/A Kolornuanco. 3C0,2. ULTRAMARA-BLANKAGRIZA-KOLORETA. [Columba livia] An: Pidgeon blue; Fi: Kyyhkysensininen; Fr: Bleu pigeon, Bleu colombe; Sv: Duvblått. Vp:oj 6. kaj 7.

21. SIRINGAGRIZ/A Kolornuanco. 19C0,2. PURPURVIOLA-BLANKAGRIZA-KOLORETA. An: Lilac gray; Fi: Syreeninharmaa; Fr: Gris lilas; Sv: Syrengrått. Vp:oj 6. kaj 7.

22. TOMATRUĜ/A Kolornuanco. 15Ĉ0,9. ORANĜARUĜA-GRIZETA- TRE KOLOREGA. [Lycopersicum esculentum] An: Tomato red; Fi: Tomaatinpunainen; Fr: Rouge tomate; Hi: Tomate; Sv: Tomatrött.

Vp:oj 6. kaj 7.

23. DROMEDARBRUN/A = KAMELBRUN/A P.

24. HELIANTAFLAV/A P (Sunflorflava).

25. TURKIBLU/A.

SUSPENSIAĴO

26. DAMAROREZIN/O Suspensiaĵo. Ĝi originas el Sundaj Insuloj kaj Filipinoj. Oni trovas kvin diversaj specioj, nome: 1. Vitreca, iom flaveta; 2. Grizbruna; 3. Rozruĝa; 4. Malhelbruna, surface aŭ flava aŭ blanka; 5. Nigra, kiel tre maldika tavolo iom ruĝeta. Ĝi solviĝas kun benzeno, benzino kaj terebinto, sed ne tiel facile kun alkoholo. Pere de alkoholvaporo oni freŝigas la malnovajn damarŝmiraĵojn.

27. LINOLE/O Suspensiaĵo. Ĝi estas sekiĝema oleo. Ĝin oni fabrikas el semoj de lino, aŭ premite, aŭ hejtpremite, aŭ hejtvaporite. Ĝia specifa pezo estas en 15°C 0,930...0,935. Ĝi viskoziĝas en malvarma temperaturo de -10°C, solidiĝas de -15° C kaj glaciiĝas de -20°C, kaj post la varmiĝo devenas en la saman staton. Kiel pura, ĝi estas la plejbona oleo en belartaj farboj.

28. VAKS/O [P] Suspensiaĵo. La vakson eblas utiligi kaj neprilaborite kaj blankigite. La fandovarmo estas +62°C kaj en la stato, solveblas kun terebinto kaj sekiĝema oleo. Ĝin eblas miksi kun kolormaterialo kaj kiel emulsio kaj kiel solvaĵo kun kaj terebinto kaj oleo. Miksaĵon de terebinto kaj vakso eblas ŝmiri sur preta pentraĵo. La vakson eblas miksi ĝis 2% kun oleofarbo, ne pli. Vidu: Abelvakso. Vp: 6.

29. SIKATIV/O [P] Suspensiaĵo. [Kalcia klorido, $CaCl_2$] Olesekigaĵoj ekzistas diversaj specioj, kaj diversaj miksaĵoj. Oni uzu ĝin ne pli ol 1...2%, aŭ pli volonte neniom. Vidu: Olesekigaĵo. Vp: 6.

30. TEREBINT/O Suspensiaĵo. Ĝi estas terpeno (etera oleo). Ĝi estas senkolora ligvaĵo, kiel pura akvo kaj havas bonan odoron. Ekzistas du specioj, turpentino kaj purigita. Ĝi estas solvilo kaj diluilo por farboj.

31. ABELVAKS/O = VAKS/O [P].

32. BALZAM/O = VENECIBALZAM/O = VENECITURPENTINO.

33. HELIANTOLE/O [P] (Sunfloroleo).

34. KOPALAĴ/O. KOPALREZIN/O.

KOMENTARIO

KLARIGOJ

En la paĝo 6 de BELARTA VORTARO estas duliteraj mallongigoj - escepte unu- kaj triliteraj - el la nomoj de farbmaterialoj kaj el la klarigoj de la kemia konduto. Mallongigoj el la kelkaj lingvonomoj kaj el la proponoj de mi mem - [P] = Preferinda; [H] = Hezittaksinda; [E] = Evitinda; Vp = Vidu la paĝon.
En la paĝo 7 de BELARTA VORTARO estas klarigo de signoj - numeroj kaj literoj. 20-ona kolorcirklo de 0. viola...al 19. purpurviola, kun nomoj de koloroj, sed numere estas praktikata la 40-ona. 9 gradoj de la grizeco de A. blanka...ĝis Ĝ. nigra. 11 gradoj el kvanto de la koloreco de 0,0 senkolora...ĝis 1,0 tutkolora.

FONETIKO

7...9., 12., 20., 21., 24. kaj 26. Ĉiuj ses artoskolnomoj de **sureal/-** havas preskaŭ identan priskribon. **Superracionalismo** estas Franca disbranĉiĝo de **surrealismo**. **Superrealismo** estas sama kun surrealismo. ROSSETTI preferis la formon **surealismo** kun unu ro, kaj mi taksas ĝin taŭga, ĉar temas pri nova Esperantovorto, ne Esperantaj **sur+real/ismo**. Do, la afero estas

fonetika ne gramatika - Esperanto ne havu duoblajn konsonantojn en siaj radikvortoj . Oni rimarku, ke estas praktike meti vokalon inter kvar sinsekvaj konsonantoj en kunmetaĵoj.

GRAMATIKO

12. kaj 24. Oni studu eblecojn el vidpunkto de gramatiko, por formi novajn radikvortojn.

HISTORIO

2., 11., 13., 25. kaj 29. Oni devas malkovri ankaŭ la historian tavolon de la vorto. Oni komparu ekz. japana, bluo de prusio, lazur...bluo, en blazona lingvo, bluo de Turkio, balzamo de Venecio ktp.

KOLIZIO

3. kaj 12. **Kromo**... estas konflikta vortero. PIV konsilas uzi ĝin kun o-finaĵo disde la gramatika **krom**, kaj mi taksas ĝin taŭga. Nur Ĥemia Fakterminologia Komisiono proponas formon **kromio**. Oni rimarku, ke en PIV vorto juvelisto havas signifon: *Homo, kies metio estas fari aŭ vendi juvelojn.* Pro tio artisto havu radikvorton **juvelart/-**.

KULTURO

2. kaj 5. Oni devas respekti la originon de la afero. Ekz. povas ekzisti iu alia floraranĝarto, sed almenaŭ la japaneca havas la nomon **ikebano**.

LOGIKECO

1...4. **Artfako, -/isto, -/ado** kaj **-/o** aŭ **-/aĵo**;
5...8. **-/ismo** kaj **-/isto**; 9...13. **-/o** kaj **-/a**; Pere de la unueca vortfarado oni celas doni iom pli da logikeco por la vortuzo.

ORTOGRAFIO

8., 20., 21. kaj 26. Oni evitu la duoblajn konsonantojn en la radikvortoj pere de certaj vokaloj.

STRUKTURO

1., 3., 6., 19., 23., 28., 29., 31. kaj 32. Ĉefprincipo estas, ke el inter la bonaj radikvortoj oni elektu la plej mallongajn radikojn. Ekz. sufiĉas **fresk/-, betulblank/-, kamelbrun/-, vaks/-, sikativ/-, vaks/-** kaj **balzam/-**.

UNUECO

1...13., 19., 23., 24., 28...31., 33. kaj 34. Pere de ᴿ-signoj (=rekomeninda) oni celas al unuecigo de la vortuzo. Krome eblas, ke la nun flankenŝovitaj vortoj havos iun alian fakterminan funkcion pliposte.

KONKLUDO

Kolektado de vortoj por BELARTA VORTARO havas signifon de sociscienca temo, kiu estas vere malmulte plugita kampo en Esperanto. En la kolektado oni klopodu trovi koherecon kaj tendencas ĝin krei, t.e. oni faras analokion. La ĉefprincipoj estu: neceso kaj sufiĉo. Oni evitu pseŭdosufiksojn, se tiu donas plibonan resulton.
Pri la vortoj kun pseŭdosufiksoj respondas ZAMENHOFF en Oficiala Gazeto 1911 (respondo 55) sekve: "...Ni povas *esperi*, ke pli aŭ malpli frue la pseŭdosufiksaj vortoj "fremdaj" fariĝos arĥajismoj [arkaismoj] kaj cedos sian lokon al vortoj "pure Esperantaj"; ni povas eĉ *konsili* tion; sed *postuli* tion ni *ne* povas,... ...sed ŝajnas al mi, ke estas multe pli bone havi en la unua tempo ian "embarason de riĉeco", ol malutili al si per ia ne sufiĉe matura dekreto, elĵetante el la lingvo vortojn, kies elĵetindeco ne estas ankoraŭ por ni tute certa...".
Kiel oni vidas el la ekzemploj (1...34.) mi uzas simplan kaj elementecan lingvaĵon en la interpretoj, por ke la leganto ne devas

studi la nekonatajn vortojn, pere de nekonataj vortoj.
Laŭ mi la literaturo estas la ĉefportanto de Esperantokulturo, kaj tiele precipe la fakterminaroj havas la ege gravan lokon, ĉar la terminaroj estas unu el la bazoj por la evoluo de la kulturo - arto, industrio, komerco, scienco, tekniko ktp.
Mi faras nur bazan laboron por la vortaro, kolektante aron da vortoj. Pro tio, kompetentaj kontrolantoj por mia verkado estos ege gravaj kaj endaj. La laboro daŭros almenaŭ kvin jaroj, kaj poste kroman kvin jaroj, kun preparlaboroj, antaŭ ol oni atendu presitan, 1000 paĝan libron, se tiam ekzistas mono por la efektivigo.

Adreso de la aŭtoro:
Aulo MINELL
Laurinkatu 17
FIN-41160 TIKKAKOSKI
F i n n l a n d o

Mallongigoj

Ci	Cinabroruĝo
Fe	Fero
Ka	Kalko
Kf	Kadmioflavo
Kr	Kadmioruĝo
Kro	Kromoflavo
Li	Litopono
Mb	Montobluo
Mv	Montoverdo
Pb	Plumboblanko
Pm	Plumbominio
Pr	Prusibluo
Ul	Ultramarbluo
Zi	Zinko
Zs	Zinkosulfuro

An	La angla	Ar	La araba
Fi	La finna	Gr:	La greka
Fr	La franca	Hi:	La hispana
Ge	La germana	La:	La latina
It	La itala	Ne:	La nederlanda
Sv	La sveda	Po:	La portugala

a	Eblas miksi kun la akvaĵoj	be	Becker
k	Eblas miksi kun alkaloj	gu	Guitar
l	Toleras lumon	ro	Rowney
o	Eblas miksi kun oleoj	ta	Talens
s	Toleras sulfurhidrogenon	wi	Winton
v	Toleras varmon (200°)		

XX	Venenega	P	Preferinda	****	Bona
X	Venena	H	Hezittaksinda	***	Kontentiga
x	Dubinda	E	Evitinda	**	Nebona

Vp Vidu la paĝon

Klarigo de signoj

0. VIOLA = -566 ≙ 400
0,5 =426
1. BLUVIOLA = 440
1,5 = 452
2. VIOLBLUA = 460
2,5 = 465
3. ULTRAMARA = 469
3,5 LAZURBLUA = 472
4. BLUA = 475

LA KOLORCIRKLO:



EKZEMPLO DE LA UTILIGO: 8D0,5

LA NUANCOJ DE LA UNU KOLORO:



GRADOJ DE LA GRIZECO. RIMARKU LA EKZ:OJN

4,5 ĈIELBLUA = 478 mμ
5. TURKISA = 482 mμ
5,5 = 487 mμ
6. VERDABLUA = 493 mμ
6,5 = 500 mμ
7. BLUVERDA = 511 mμ
7,5 = 527 mμ
8. VERDA = 544 mμ
8,5 KROMOOKSIDVERDA = 554 mμ
9. BRILIANTVERDA = 560 mμ
9,5 FILIKVERDA = 564 mμ
10. FLAVAVERDA = 568 mμ
10,5 = 570 mμ
11. VERDAFLAVA = 571 mμ
11,5 = 572 mμ
12. FLAVA = 573 mμ
12,5 NAPOLOFLAVA = 576 mμ
13. ORANĜAFLAVA = 581 mμ
13,5 OKSIDOFLAVA 585 mμ
14. ORANĜA = 590 mμ
14,5 SIENTERORANĜA = 595 mμ
15. ORANĜARUĜA = 601 mμ
15,5 CINABRORUĜA = 607 mμ
16. RUĜA = 614 mμ
16,5 KARMINRUĜA = 630 mμ
17. PURPURARUĜA = -495 ≙ 700 mμ
17,5 RUĜBETRUĜA = -510 mμ
18. PURPURA = -526 mμ
18,5 = -542 mμ
19. PURPURVIOLA = -557 mμ
19,5 = -564 mμ
0. = -566 ≙ 400 mμ

A. BLANKA
B. BLANKETA
C. BLANKAGRIZA
Ĉ. GRIZETA
D. GRIZA
E. GRIZEGA
F. NIGRAGRIZA
G. NIGRETA
Ĝ. NIGRA

1,0 TUTKOLORA
0,9 TRE KOLOREGA
0,8 KOLOREGA
0,7 KOLOREGETA
0,6 KOLORA
0,5 MEZKOLORA
0,4 MEZKOLORETA
0,3 IOM KOLORA
0,2 KOLORETA
0,1 IOM KOLORETA
0,0 SENKOLORA